


Geedzoj Michèle Villers - Hubert De Meyere

*AGAY
APE
RETEJO*



*2011
2015*

Êsdatígita Februaro 2015

prelegas pri binça karnavalo

Carnaval de Binche

15,16 et 17 février 2015



Oficiala retejo de la Karnavalo

<http://www.carnavaldebinche.be/accueil.html>

La ejo ekzistas ankaŭ en la nederlanda kaj en la angla.

Kial ne en Esperanto?

Ĉu bona ideo por venontaj kunvenoj de niaj Eaj kluboj en Valonio?

Alvoko al valonaj esperantistoj !



Dimanche Gras : Dès 9h : Travestis, vides et tambours / 15h : Place Eugène Desteirac : Départ du Cortège.

Lundi Gras : Dès 10h : Sortie des jeunesses à la voile / 16h : Grand-Place : Rondou de l'amitié / 19h : Place Eugène Desteirac : Feu d'artifice.

Mardi Gras : Dès l'aube : Gilles, Paysans, Pierrots et Arlequins animent la ville / À partir de 8h : Port du masque de cre et réception à l'Hôtel de Ville / 15h : Cortège et rondou sur la Grand-Place / 19h30 : Cortège aux lumières et rondou / 21h30 : Embrasement de la Grand-Place.

Patrimoine
Culturel Immatériel
de l'Humanité



INFOS : Office du Tourisme - Grand-Place - 7130 BINCHE
061/33.67.27 - tourisme@binche.be - www.carnavaldebinche.be

Ĉi maldekstre la 2015-a afiŝo de la karnavalo.

KARNAVALO de BINCHE

*Ni mem tradukis vortojn
pri kiuj ni ne trovis tradukon*

Binche : Bincho

Gille : ĵilo

Soumonce : sumonco

Ramon : ramono

Pierrot : pieroto



ENHAVO

Ĝisdatigita Februaro 2015

1. KARNAVALO *Alklaku*
2. LA URBO BINCHE *Alklaku*
3. LA AKTOROJ DE LA KARNAVALO *Alklaku*
4. KARNAVALA KALENDARO *Alklaku*
5. BILDOJ *Alklaku*
6. MUZIKOJ *Alklaku*

Interview RTL Carnaval de Binche 2009 -1min51 *video 1 Teksto*

Eblas elŝuti ĉi tiun raporton el nia paĝaro : www.hubertdemeyere.com/2015_BINCHE.pdf

Per la ligiloj eblas facile aliri ajnan ĉapitron. Elektu la enhavon de intereso.

POR PAĜUMI LA DOKUMENTON SINSEKVE, UZU LA KLAVARON AŬ LA FINGRON.

(se via komputilo permesas tion)

*La **Home** klavo ebligas ĉiumomente atingi la supron de la dokumento. La **PgDn** klavo ebligas konsulti la dokumentojn sinsekve.*

Ne ĉiuj klavaroj enhavas tiujn klavojn sed, preskaŭ ĉiuj proponas similajn funkciojn; ekzemple, per pluraj specoj da sagoj.

BONVOLU UZI LA FUNKCIOJN DE VIA SISTEMO.

1. KARNAVALO

Karnavalo estas arkaika tradicio ligita al sezonaj cikloj kaj agrikulturaj produktoj.

Kiel multaj aliaj festoj, ĝi estas reakiro de la kristanismo de antikvaj paganaj kultoj.

Kutime ligita al la kristana festo de Pasko, la karnavalo markas la lastan okazon festi kaj manĝi grasaĵojn antaŭ karesmo.

Lingvistoj memortenas la italan devenon : « carnevale », carne (karno) kaj levare (forpreni).

Karnavaloj tre popularas en Eŭropo kaj Sudameriko.

Ĝenerale karnavalo konsistas el tempo kiam tieuloj kaŝvestinte vagadas, kunvenas por kanti kaj danci en la stratoj, kaj ĵetas konfetojn, eble ĉirkaŭ parado.



Binča karnavala tradicio estas unu el la plej antikvaj kaj reprezentivaj de Valonujo. Ĝia fama Ĵilo « Gille » fascinas homojn tra la tuta mondo.



KARNAVALO de BINCHE

2003
agnoskata de
UNESCO

kiel

"Ĉefverko de
nemateria
heredaĵo
de la
homaro"



2. LA URBO BINCHE

Malgranda belga urbo
(pli malpli dek mil loĝantoj)

Valona regiono,

Provinco : Henegovio





La urbo atingis sian ekonomian kaj potencan pinton kiam Belgujo estis sub hispana regado (XVIa jarcento).

Binĉo estis la loĝejo de Maria de Hungarujo, fratino de Karolo La Kvina kaj registino de Nederlando.

Binĉo havas la plej bone konservitan urbomuron de Belgujo.

Ĝi konstruiĝis dum la 13-a jarcento.



Binĉo havas fascinan internacian muzeon de maskoj kaj karnavalo.

Originala, unika en Eŭropo.




Sur la fasado de la
urbodomo

Armiloj
de
Karolo la Kvina

kaj sia devizo
"PLVS OVLTRE"
(ĉiam pli for)

Estas ankaŭ
devizo de Binĉo
kaj de Hispanujo



**Dum la vizito de
Karolo la Kvina
al la kastelo de Binçô,
en 1549**

**la urbanoj vestis sin
kiel la Inkaoj de Peruo,
por honori sian princon.**

**Laŭ la legendo
estas
la origino
de la hodiaŭaj**

« Ĵiloj » de Binçô.

3. LA AKTOROJ DE LA KARNAVALO

La ĉefaj eminentuloj estas la ĵiloj,

kiuj dancas laŭ tradiciaj karnavalmuzikoj, luditaj de malgranda fanfaro, kiu konsistas el tamburoj, latuninstrumentoj kaj tamburego.



La binĉaj ĵiloj

devas plenumi devigajn kutimojn:

- nur eliri dum grasmardo,
- nur en la urbo de Binĉo,
- ne moviĝi sen la subteno de minimume unu tamburisto,
- ne sidiĝi publike,
- neniam esti ebria,
- devige esti binĉdevena.



La ekipaĵo de la ĵilo :

krispo, bluzo, pantalono,
feltoŝuoj, lignoŝuoj,

la « apertintaille »
(zono de sonoriletoj),

tintilo,...

Por doni al la ĵilo la finan formon,
oni remburas la bluzon per pajlo.

Ĉi tiu operacio nomita
« ĝibigado » okazas grasmardon
frumatene.

Nokte de tiu sama tago, la « ĝiboj »
estos ceremonie bruligitaj. Ŝajnas
ke ĉi tiu tradicio ne okazas en
Binĉo.



La ekipaĵo de la ĵilo : ĉapelo kun strutplumoj, vaksa masko, « ramono », korbo, oranĝoj.



Ĵiloj tute ekipitaj sed sen ĉapeloj

La aliaj uloj,
kiuj formas la societojn
nomitajn « fantazie » :

Kamparano (infanoj de
*Notre Dame de Bon
Secours* gimnazio),

Arlekeno (infanoj de la
urba Reĝa Ateneo),

Pierotoj (infanoj de la
Malgranda Kolegio).





Ekde sia iniciato en 1929, la Reĝa Societo "La Kamparanoj" alportas sian freŝecon, kaj iĝis unu el la plej tipaj kaj tradiciaj aktoroj de la binĉa karnavalo.

La Kamparano plej proksimiĝas al la Ĵilo. Multaj similecoj ekzistas inter ili :

- masko el vakso, sed sen lipharoj,
- strutplumoj sur ĉapelo,
- ramono, sed el malsama ligno,
- devige binĉdevena,
- pasio por sia karnavalo ...

La kondiĉoj por membriĝi estas ĝuste identaj al tiuj de ĵilo.
Multaj el ili fariĝas ĵilo post la aĝlimo de 21 jaroj.

La Kamparanoj



La binĉaj Ĵiloj kaj Kamparanoj estas la solaj kiuj rajtas surmeti la senkomparan vaksan maskon, kiu simbolas egalecon inter ĉiuj.

La Arlekenoj



Arlekenoj portas taŭgan maskon deveninta el la « *commedia dell'arte* ».

La Pierotoj



La Pierotoj havas nigran lupan maskon.

4. KARNAVALA KALENDARO

PREPARADOJ

La loĝantoj de Binche laboras la tutan jaron por pretigi karnavalon :

- reperi materialon,
- elpensi kaj kudri novajn kostumojn,
- provludi dancojn kaj muzikojn,
- partopreni konkursojn pri afiĉoj,
- fari aranĝojn kun fremdaj kunuloj, ktp...

FESTTAGOJ

Rimarkinde estas ke ĉiuj partoprenas : infanoj, junuloj, plenkrekuloj, maljuniĝintaj homoj, ktp...

La kronologio estas neŝanĝebla kaj situas en la jara kalendaro rilate al la dato de Pasko.

KARNAVALO DE BINCHE 2015 KALENDARO

KARNAVALO DE BINCHE 2015 KALENDARO			
Tagoj antaŭ Pasko			
		SABADO : baloj	DIMANĈO
			LUNDO
			MARDO
-91	4-janv	D6	
-84	11-janv	D5	
-78	17-janv	S4	
-77	18-janv	D4	
-71	24-janv	S3	
-70	25-janv	D3	
-64	31-janv	S2	
-63	1-févr	D2	
-57	7-févr	S1	
-56	8-févr	D1	
-55	9-févr	J6	Trouilles de Nouille
-49	15-févr	G1	GRASA DIMANĈO
-48	16-févr	G2	GRASA LUNDO
-47	17-févr	G3	GRASA MARDO
-46	18-févr	Cindromerkredo KARESMO	
0	5-avr	Pasko	

ANTAŬ-KARNAVALO

Infanoj

Socialista junularo

Juna liberala gardaro


Reĝa katolika junularo

KARNAVALO

GRASAJ

TAGOJ

La originala kaj aŭtentika karaktero de binĉaj tradicioj
faris la reputacion de la KARNAVALO de BINCHE



La festadoj
okazas laŭ du partoj :
la karnavalo mem
kaj
la antaŭkarnavalo,
tempo de la « sumoncoj ».

Karnavalo komencas
49 tagojn antaŭ Pasko
kaj
la sumoncoj ses semajnojn
antaŭ
la tri « grasaj tagoj ».

4.1. Antaŭ karnavalo

4.1.1. Soumoncoj : ses dimanĉoj.

La sesa kaj kvina dimanĉoj antaŭ karnavalo (D6, D5) : unuaj provludoj ĉe baterio.

La societoj (ĵilgrupoj kaj fantaziaj societoj) fruvespere kunvenas kaj promenas **sen festvestoj** en la stratoj de Binĉo je la sono de **tamburoj**.

La kvara kaj tria dimanĉoj antaŭ karnavalo (D4, D3) : **sumoncoj ĉe baterio**. Kompanioj dancas sur la stratoj de Binĉo, ĉiam je sono de **tamburoj**.

Ĉiu societmembro ŝuiĝas **lignajn ŝuojn**, surhavas la « **apertintaille-on** » (sonorilzonon), kaj tenas la « **ramonon** » en la mano.

La du dimanĉoj antaŭ karnavalo (D2, D1) : **soumoncoj kun muziko**. **Latuninstrumentoj** aperas kaj iliaj sonoj miksas kun la sono de tamburoj por ludi sensekve la dudekses tradiciajn melodiojn de la karnavalo.

[Video.2](#) 2008 1min25

Je ĉi tiu okazo, membroj de ĵilaj kaj fantaziaj societoj **surmetas siajn pasintjarajn grasdimanĉajn kostumojn**.

4.1. Antaŭ karnavalo

4.1.2. Karnavalbaloj : la tri sabatoj antaŭ karnavalo(S3,S2,S1).

Kostumita balo organiziĝas.

Sinsekve baloj de la « Socialista Junularo », de la « Juna Liberala Gardaro » kaj la « Reĝa Katolika Junularo ».

Ĉi tiuj baloj estas festdancoj kie partoprenantoj konkuras pri inĝenieco por prepari maskvestiĝojn laŭ la temoj proponitaj de la respektivaj komitatoj.

Premioj estas aljuĝitaj al la plej bonaj kostumoj.

Iomete perdiĝas la tradicio, kiu volas ke la nefestkostumituloj sinvestigu per **smokingo** por sinjoroj kaj **balrobo** por sinjorinoj.

Ĝis la fruaj 1980 jaroj, estis vera apartigo inter la partoprenantoj sur bazo de ilia politika aliĝo, sed nun, nur amuzvolo superas.

Ne estas raraj la binĉanoj kiuj partoprenas kelkajn aŭ ĉiujn karnavalbalojn.

4.1. Antaŭ karnavalo

4.1.3. « Trouilles de nouilles » « Timegoj de Nudeloj » : lundo, ses tagoj antaŭ karnavalo.



La loĝantoj de Binĉo kaj tiuj el la regiono rajtas promeni en la urbo maskitaj.

Dum ĉi tiu maskarado, la tradicio volas ke kaŝvestintoj serĉas pri konatuloj kaj « intrigas » ĝis ili povu diveni kiu kaŝas sin sub la masko.

Se ili trovas, la malfeliĉulo devas pagi trinkaĵon
sed
se ili ne sukcesas « malmaski » lin, ili agnoskas malvenkon kaj proponas
amikecan glason.

4.2. La tri grasaj tagoj.

4.2.1. **Grasdimanĉo** : unua karnavaltago : Festkostumoj

Matene

Grasdimanĉo - la infanoj 2min34 [video.3](#)

Ĵilaj kaj fantaziaj societoj vagantas sur la stratoj de Binĉo,
vestitaj de maskkostumoj

preparitaj en granda sekreto kaj finfine publike malkaŝitaj.

La kostumoj estas el diversaj inspiroj (bestoj, stereotipaj uloj ktp).

Tamburoj, aŭ gurdo ritmas la vagadojn. [video.5](#) 2010

Posttagmeze

Latuninstrumentoj kaj tamburoj aliĝas al la irantaro.

Je la tria posttagmeze, la diversaj societoj

rekuniĝas ĉirkaŭ la stacidomo de kie la procesio ekmarŝos

laŭ la ritmoj de la dudekses karnaval-melodioj.

Tiam oni povas danci kaj miriĝi pri la imagpovo kaj sperto de la elpensintoj kaj
fabrikintoj de la kostumoj.



Gurdo



Festkostumoj





Oni ofte trovas societon tute samvestita.



Oni ofte trovas societon tute samvestita.

4.2. La tri grasaj tagoj.

4.2.2. **Graslundo** : ankaŭ nomita tagon de infanoj aŭ junularoj

Matene

La binĉanoj kaj iliaj gastoj retrovas sin matene en la stratoj.

La junularoj : Socialistaj , Katolikaj, kaj junaj Liberalaj Gardoj , rondiras la trotuarojn, vagas de kafejo al kafejo akompanita de fanfaroj, al la sono de la gurdo

Ĝenerale, la junularoj estas akceptitaj ĉe regionaj elektitaj respondeculoj kiuj proponas amikecan glason.

En la plejmultaj trinkejoj de la urbo,
« konfetaj » bataloj furiozas. [Video.6](#) 2008

Posttagmeze

La tri « junularoj », ĉiu akompanita de baterio kaj tradicia latuna bando, ekdirektiĝas al la stacia skvaro

kie ĉirkaŭ la 19a, la fajraĵo komencas

[video.7](#) 2008 3min42

antaŭ la admirantaj okuloj de grandnombre rekunigitaj gapvaguloj.

Graslundo : ankaŭ nomita junularan tagon



Graslundo : « konfetaj » bataloj furiozas en la kafejoj.

Graslundo : ankaŭ nomita infanan tagon



4.2. La tri grasaj tagoj.

4.2.3. Grasmardo : kulmino de la karnavalo.

Por multaj binĉanoj, ĉi tiu tago estas la plej bona de la jaro.

Je tagiĝo (ĉirkaŭ la kvara matene) komencas la kolekto aŭ kapto de ĵiloj.

Al la sono de *la matena aŭbado* (ŝalma ario),

la ĵiloj reciproke vagadas de hejmo al hejmo por kunveni. [video.8.1](#)

Ili akceptas unu la aliajn kun glaso da ĉampano.

Matena aŭbado (ŝalma ario) : 1min40 [video.8](#)

Ĉiu grupo de ĵiloj direktas sin al sia societlokallo kie ili matenmanĝas ostrojn kaj ĉampanon, kiel tradicio postulas.

Matenfine, Ĵiloj, Kamparanoj, Pierotoj kaj Arlekenoj direktas sin al la Grandplaco por plenumigi la matenan rondon.

Poste, ili estas akceptitaj en la urbodomo.

Ĵiloj, Kamparanoj surhavas vaksan maskon,

Arlekenoj surhavas maskon deveninta de la « *commedia dell'arte* ».

La Pierotoj eniras la urbodomon maskitaj de nigra duonmasko.



Grandplaco : la matena rondo.

En la urbodomo, ili recevos de la urbestro, aŭ foje de eminenta gasto,
medalojn
por 25, 40 aŭ eĉ pli da jaroj de partoprenado en la karnavalo .

Post kelkaj dancoj sur la trotuaro kaj transiro al la dediĉita lokalo,
la ĵilo rehejmiĝas, ĉiam akompanata de tamburisto, por bone manĝi kaj
ripozi.

Ĉirkaŭ la 15a aŭ la 16a horoj, la societoj denove formiĝas.

Al la sono de karnavalaj melodioj, ili kunveniĝas por partopreni la irantaron
kiu kondukos ilin de la statuo de la Kamparano al la Grandplaca.

Dum la procesio, kie iuj ĵiloj portas ĉapelon kun strutaj plumoj,
« ĵiloranĝoj » (malgrandaj sangaj oranĝoj)
estas proponitaj al la amaso.

Video.9 ĵiloj 2min30 video.10 kamparanoj 1min30

La grupoj daŭre vagas tra la stratojn de la urbo ĝis la vespero.
(ĉirkaŭ la 21a).

Ĉiuj societoj tiam kunvenas por la fina rondo ĉe la placo.





Dank'al bengalfajroj, la ombroj projekciiĝas sur la murojn de la urbodomo,
[video.11](#)
kiu baldaŭ iluminĝos per la lumbriloj de la grandioza fajraĵo. [video.12](#)

En la urbo, la koro de la ĵiloj daŭre batos laŭ la ritmo de la tamburoj.




Reiru al la ENHAVO

La festadoj tiam finiĝas, per flamlumigo de la urba devizo, "PLVS OVLTRE
La baterioj haltas ludi antaŭ sunleviĝo je la mateno de Cindromerkedo.



5. BILDOJ



Carnaval de Binche

Patrimoine Oral et Immatériel de l'Humanité

Les 3, 4 et 5 février 2008



Crépinsson, Nathalie Hupier



BELGIQUE

RENSEIGNEMENTS:

Office de Tourisme de Binche
Hôtel de Ville - Grand-Place • 7130 BINCHE


Tel: +32 (0) 64 33 67 27 • Fax: +32 (0) 64 23 06 47
Mail: tourisme@binche.be

2008

Afişoj





2009



2010

El la maskmuzeo





Michèle kaj Hubert dankas vîn pro vîa atento.

6. MUZIKOJ

1. Interview RTL Carnaval de Binche 2009 –1min51

<http://www.youtube.com/watch?v=gSzeKquXnyc&feature=related>

2. Sumonço en muziko Binche 20-01-2008 1min25

http://www.youtube.com/watch?v=ayEAKUv_zqc&feature=related

3. Grasdimanço - la infanoj 2min34

<http://www.youtube.com/watch?v=hDbL5lqeBHQ&feature=related>

4. Grasdimanço matene FONTENAY – 0.32Min-

<http://www.youtube.com/watch?v=v3RkHTD0WsA&feature=related>

5. Grasdimança Gurdo 0min45

http://www.youtube.com/watch?v=k3CzY_HURXg&feature=related

6. Graslunda « konfetaj » bataloj 2008 2mun04

<http://www.youtube.com/watch?v=1wsHA-ghgZI>

6. MUZIKOJ (daŭrogo)

7. Graslunda fajraĵo 3min42

http://www.dailymotion.com/video/x4a0xt_feu-d-artifice-binche-lundi-gras-20_people

8. Grasmardo *Matena aŭbado* (ŝalma ario) : 1min40

<http://www.youtube.com/watch?v=r6ua-kPpjQ8&NR=1>

9. Grasmarda parado : ĵilaj oranĝoj 2min30

http://www.youtube.com/watch_popup?v=WXCrz9ibK7I&vq=medium#t=14

10. Grasmarda parado: Kamparanaj oranĝoj - 1min30

<http://www.youtube.com/watch?v=nNM2m82k4zI>

11. Grasmarda karnavalfina Bengaloj fajroj - 0min42

http://www.youtube.com/watch?v=P_kCXV5g1h0&feature=related

12. Grasmarda karnavalfina fajraĵo- 1min35

http://www.youtube.com/watch?v=qVcMo_M8Daw&feature=more_related

